Kontaktu la redakcion: kunfluo@proton.me + 31 6 19 46 48 37 aŭ @kunfluo

# Kunfluo

ĉiutaga informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj
BET-59 · Kaŭno, Litovio · 5–13 julio 2025

n-ro 1 | hodiaŭ: 21 °C | morgaŭ: 26 °C | sabato, la 5-a de julio 2025

## Bonvenon al Kaŭno!



fot. Vikipedio

## SALUTMESAĜO DE LA ALTA PROTEKTANTO



Estimataj partoprenantoj, organizantoj kaj gastoj el la tuta mondo de la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj,

Mi elkore salutas vin ĉiujn, kunvenintajn en ĉi tiu speciala internacia evento, okazanta en Litovio – ĉe la Universitato Vytautas la Granda, kiu ĉi-jare fariĝas centro de kultura kaj lingvistika kunlaboro.

La lingvo Esperanto, kreita por la ideo de homa unuiĝo, hodiaŭ estas pli aktuala ol iam ajn por la mondo, kiu serĉas komunan lingvon – kaj laŭvorte, kaj metafore. Via komunumo atestas, ke dialogo, respekto al kultura diverseco kaj paca kunlaboro inter nacioj estas eblaj kaj necesaj.

Ni fieras, ke Litovio povas esti la hejmo de ĉi tiu sencoplena renkontiĝo. La ĉi-jara kunveno iĝu ne nur bonega okazo por interŝanĝi spertojn, sed ankaŭ ebleco por refoje plifortigi pontojn inter homoj, nacioj kaj ideoj.

Mi deziras al vi inspirajn diskutojn, novajn konatiĝojn kaj sencoplenan kuneston!

Kun respekto kaj sinceraj bondeziroj,

**Juozas Olekas**
Unua Vicprezidanto de la Sejmo de Litova Respubliko



Estimataj gesinjoroj,
Nia mondo estas komuna. Ĉi tiun esperantistan idealon – unu mondo – atestas ĉiu el vi, kunvenintaj al la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Kaŭno, en la urbo, kiun vizitis ankaŭ la kreinto de Esperanto, Ludoviko Lazaro Zamenhof kaj kie lia ideo, kunligi malsamajn popolojn per ponto de neŭtrala lingvo, estis akceptita.
La lingvo kreita de la fama litvaka humanisto ne estas nur lingvistika eksperimento, ĝi estas vivanta vizio de reciproka kompreno kaj universala harmonio. Ĝi estas lingvo de espero, kiu malfermas la eblecon transpaŝi lingvajn kaj kulturajn barojn, komuniki egalece kaj pace.
La nobla kredo de Zamenhof – de Doktoro Esperanto – je interkomprena kaj paca mondo estas aparte aktuala en la kunteksto de la hodiaŭaj geopolitikaj defioj. Ĉiutage mi vidas, kiom gravas la strebado krei komunan lingvon de valoroj, kiu preventus konfliktojn kaj helpus solvi ilin.
La strebado al paco, reciproka kompreno kaj dialogo inter popoloj neniam perdos sian valoron. Unesko jam dufoje inkluzivis L. Zamenhof en la listojn de la plej famaj homoj en la mondo, emfazante la specialan signifon de ĉi tiu lingvo en la kampo de internaciaj kulturaj kaj intelektaj interŝanĝoj.
La heredaĵo de Zamenhof, kiun vi zorgeme flegas, inspiras ĉiam novajn generaciojn de parolantoj kaj certigas, ke Esperanto kaj de ĝi naskita filozofio de kunekzistado restu vivantaj kaj signifoplenaj.
Parafrazante la propran penson de Zamenhof, kiu sonis en la Unua Monda Kongreso de Esperantistoj, mi deziras, ke en Litovio ne renkontiĝu la reprezentantoj de diversaj naciecoj, sed unue – homoj kun homoj. Mi esperas, ke ĉi tiuj kunvenoj estos informaj kaj inspiraj. Bonvenon al Litovio!

**Kęstutis Budrys**
Ministro pri Eksterlandaj Aferoj de la Respubliko Litovio

---



Estimataj partoprenantoj de la Baltiaj Esperanto-Tagoj,
Estas por mi ĝojo bonvenigi vin al Kaŭno – urbo, kiu gardas malnovajn tradiciojn kaj instigas novajn ideojn kaj internacian kunlaboradon.
Por ni estas granda honoro, ke ĉi-jare ĝuste ĉi tie kunvenas via komunumo el homoj de diversaj landoj, unuigitaj per komuna lingvo kaj komunaj valoroj.
Mi deziras, ke ĉi tiuj tagoj en nia urbo fariĝu memorindaj por vi. Tiu ĉi tempo plifortigu la ligojn, instigu novajn dialogojn kaj permesu al vi sperti la gastamon de Kaŭno.
Mi deziras al vi enhavoriĉan, inspirplenan kaj amuzan tempon!

**Visvaldas Matijošaitis**
Urbestro de Kaŭno

## Ejoj de la universitato por la uzo de BET-59

Partoprenantoj de BET-59 senlime povos uzi diversajn salonojn, aŭditoriojn kaj aliajn ejojn de la Universitato Vytautas la Granda (str. S. Daukanto 28 kaj 27).
En la ĉefa universitata konstruaĵo (str. S. Daukanto 28) estas uzebla **Granda salono** – 725 sidlokoj kun plene moderne ekipita aparataro. Tie okazos la solena inaŭguro kaj kelkaj vesperaj kulturaj programeroj.
En la aŭditoria parto (str. S. Daukanto 28, alia enirejo):
– sur la unua etaĝo:
· aŭditorio n-ro 101 – 24 sidlokoj
· aŭditorio n-ro 107 – 24 sidlokoj (**libroservo**)
– sur la dua etaĝo:
· **Senata salono** – 148 sidlokoj
· salono n-ro 203 (por **kafpaŭzoj**)
· aŭditorio n-ro 212 – 20 sidlokoj
– sur la tria etaĝo:
· aŭditorio n-ro 306 – 35 sidlokoj
– sur la kvara etaĝo:
· aŭditorio n-ro 401 – 102 sidlokoj
· aŭditorio n-ro 403 – 103 sidlokoj
· aŭditorio n-ro 404 – 24 sidlokoj
· aŭditorio n-ro 405 – 24 sidlokoj
· aŭditorio n-ro 406 (komputila klaso), 30 lokoj
En la apuda konstruaĵo (str. S. Daukanto 27) sur la unua etaĝo troviĝas **Teatra salono** – 80 sidkoloj. Tie okazos kelkaj kulturaj programeroj.
Ĉiuj salonoj kaj aŭditorioj estas moderne ekipitaj kaj facile atingeblaj por handikapitoj.
Grava rimarko: En Litovio teretaĝo titoliĝas kiel la unua etaĝo kaj tiel la numerado iras supren. Do, ideo de teretaĝo kiel "nula etaĝo" ne ekzistas.

**Povilas Jegorovas**

## Atentu! Nova horo por la prelegoj de prof. Koutny

Ĉiuj prelegoj pri esperantologio de prof. Ilona Koutny (krom dimanĉa!) okazos ne je la horo indikita en la kongresa libro, sed **je la 10-a horo matene** (dimanĉon je la 11-a horo).
La aktuala programo kun eventualaj programŝanĝoj aperos ĉiutage en *Kunfluo*.

## AKTUALA PROGRAMO

### Sabato, la 5-a de julio

**09.00 – 22.00** Registrado de la partoprenantoj, loĝigo, informoj (*ĉefa universitata konstruaĵo, str. Daukanto 28*)
**13.00 – 14.00** Tagmanĝo (memstare)
**18.00 – 19.00** Vespermanĝo (memstare)
**19.30 – 20.00** Komuna organiza kunveno de BET-anoj (*Senata salono de la ĉefa universitata konstruaĵo*)
**20.00 – 21.00** Violona koncerto de Sigita Railaitė-Sičiūnienė (*Senata salono*)

### Dimanĉo, la 6-a de julio

**09.00 – 10.30** Matenmanĝo (memstare)
**10.30 – 11.00** Organizaj kunvenoj de gvidantoj kaj vizitantoj de ĉiunivelaj E-kursoj, de gvidantoj kaj prelegantoj de la Somera universitato, de gvidantoj kaj prelegantoj de SUS de AIS, de gvidantoj kaj vizitantoj de aliaj konstantaj programeroj (*Senata salono*)
**11.00 – 12.00** Prelego el la ciklo de prof. Ilona Koutny pri esperantologio. La unua prelego: "Esperanta kulturo – ĉu propra, ĉu transprenita, ĉu internacia?" (*Senata salono*)
**11.00 – 12.00** Inaŭguro de SUS de AIS. La unua prelego de prof. Amri Wandel: "Pri astrofiziko" (*aŭditorio 401*)
**11.00 – 13.00** La unuaj lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (*aŭditorioj 212, 306, 404, 405, 406*)
**12.00 – 13.00** Prelego el la ciklo de Aida Čižikaitė pri Litovio, ties kulturo, lingvo. La unua prelego: "Jara rado – popolaj festoj kaj tradicioj" (*aŭditorio 306*)
**13.00 – 14.30** Tagmanĝo (memstare)
**15.00 – 16.00** **Solena inaŭguro de BET-59** (*Granda salono*)
**16.30 – 17.30** Inaŭgura koncerto de la koruso "Gintaras" (*Granda salono*)
**18.00 – 19.00** Akcepto de la Rektoro de la Universitato (*apud Granda salono*)
**19.30 – 20.30** Vespermanĝo (memstare)
**21.00 – 21.30** Komuna kantado de Litovia himno okaze de ŝtata festo (ĉiuloke)

Wi-Fi

## Pasvorto de la intereto

La uzo de la universitata vifio estas senpaga por BET-anoj. Por uzi la vifion (Wi-Fi) necesas entajpi la pasvorton:

**9Un8eUPoP9C6tNb**

## 47 Per buso al la studenta domo

Utila informo por tiuj, kiuj dum BET loĝas en la studenta domo ĉe str. Jonavos 178. De la universitato oni povas veturi tien per la **buso n-ro 47**. Necesas iri ĝis la haltejo **Mokyklos bendrabučiai**, kiu situas tuj apud la studenta domo. Dum la labortagoj la buso kursas ĉiun duonhoron, dum la semajnfino – unu fojon hore. La veturado estas senpaga. De la haltejo **Lituanika** en la malnova urbo veturas tien ankaŭ la buso **n-ro 20**.

## Datoj de la ekskursoj

**1. La tuttaga ekskurso**
Al la regiono Vilkavikis, kie estas produktata Esperanta glaciaĵo
– la 9-an de julio

ArtGlacio

**2. Duontagaj ekskursoj**
2.1. Ensemblo de la palaco Raudondvaris
– la 8-an de julio (ĝis la tagmezo)
2.2. Panoramoj de Kaŭno
– la 10-an de julio (ĝis la tagmezo)
2.3. La padoj de anĝeloj
– la 10-an de julio (je la 16-a horo)

**Enskribiĝo por la ekskursoj kaj la pago okazas dum la registrado post la alveno al BET.**

## Kial *Kunfluo*?

Se vi ĵetas rigardon al la mapo de Kaŭno, vi tuj povas rimarki, ke la urbo troviĝas en la kunfluejo de du gravaj riveroj: okcidente de la urbocentro *Neris* enfluas en la pli grandan *Nemunas* (Nemano/Nemuno). Tiel la urbo markas la kunfluon de la du riveroj.
Ni esperas, ke ankaŭ la ĉi-jara BET donos spacon por kunfluo. Ni venas al Kaŭno el preskaŭ tridek landoj, kun malsamaj kulturoj, lingvoj, kutimoj. Sed dank' al Esperanto ni povas kuniĝi – renkontiĝi kaj interkomunikiĝi – kaj krei kunfluon de kulturoj kaj ideoj.
La riĉeco de tiuj interŝanĝoj respeguliĝos en la kutima ĉiutaga informilo de BET, ĉi-jare kun la nomo *Kunfluo*. Vi trovos en ĝi lastajn novaĵojn, informojn pri programŝanĝoj, priskribojn de unuopaj programeroj, anoncojn, raportojn kaj... eble ankaŭ vian propran kontribuaĵon?
Ankaŭ vi povas kontribui al *Kunfluo*! Viaj tekstoj kaj/aŭ fotoj estas tre bonvenaj!
Vi povas kontakti la redakcion per retpoŝto, WhatsApp, Telegram, Signal aŭ... simple per la redakcia leterkesto ĉe la akceptejo.

**Paweł Fischer-Kotowski**, redaktoro

**FINANCA SUBTENANTO DE BET-59**

iniciatyvos KAUNUI

**KUNFLUO** estas ĉiutaga informilo de BET-59. Redaktoro: Paweł Fischer-Kotowski, ✉ **kunfluo@proton.me**
Kontaktu la redakcion ankaŭ per SMS aŭ unu el la poŝtelefonaj aplikaĵoj: WhatsApp, Telegram aŭ Signal:

**+31 6 19 46 48 37** aŭ **@kunfluo**

en Signal: @kunfluo.2025